
**PAIVA NETTO skribas: "Homa maŝino kaj oleo de sento"**

# BONA VOLO

www.bonavolo.com

JARKOLEKTO 25 • N-ro 68

ELEVAÇÃO




Eniro de la internacia lingvo en la reta amaskomunikilo kaj la konsekvencoj por la E-movado

**D-ro Paulo Sérgio Viana parolas pri la temo de la Kongresego 2011, en "Ne forgesu Robinson Crusoe!".**

**Unuiĝintaj Nacioj konas surloke la agadon de Legio de Bona Volo en faveloj de Rio-de-Ĵanejro**

# Templo de Bona Volo

## Unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo/DF - Brazilo





Kun la apogo de Virinoj, la direktoro-prezidanto de LBV, José de Paiva Netto, fondis la Templon de Bona Volo (TBV). Aklamita de la popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo/DF, Brazilo, ekde kiam ĝi estis fondita, en 21/10/1989, ĝi jam ricevis pli ol 21 milionojn da pilgrimantoj. Laŭ oficialaj datumoj de Sekretariejo pri Turismo de la Federacia Distrikto (Setur), ĝi estas la plejmulte vizitita monumento de la ĉefurbo de Brazilo. Apud Parlamundi kaj ĝia administra sidejo, la Templo de Paco konsistigas la Ekumenan, Arkitekturan Ensemblon de Legio de Bona Volo.

**Vizitu ĝin! SGAS 915 – Lotes 75/76**

**Informoj: (+5561) 3245-1070 • www.tbv.com.br**

ELEVAÇÃO

BONA VOLO

25-a jarkolekto N-ro 68

BONA VOLO estas kvarmonata publikigaĵo de LBV, eldonita de Eldonejo Elevação. Ĝi estas registrita per n-ro 18166, la 16-an/3/2006, sur la libro "B" de la 9-a Notario pri Registro de Biloj kaj Dokumentoj de San-Paŭlo, Brazilo.

**DIREKTORO KAJ ĈEFELDONISTO:** Francisco Periotto MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

**ĜENERALAJ KUNORDIGANTOJ:** Gerdeilson Botelho kaj Rodrigo de Oliveira

**SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO:** Adriane Schirmer, Ana Paula de Oliveira, Angélica Periotto, Cida Linares, Fabiano Henrique, Felipe Duarte, Jefferson Rodrigues, Jéssica Botelho, Jéssica Domingues, José Roberto Tenório da Silva, Leila Marco, Letícia Rio, Maria Aparecida da Silva, Neuza Alves, Paulo César Pereira, Paulo Sérgio Viana, Rafael Ferro, Raquel Bertolin, Rosana Bertolin, Natália Lombardi, Silvana Bosso, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri.

**KOVRILO:** Felipe Tonin

**GRAFIKA PROJEKTO KAJ KOMPOSTADO:** Diego Alves, Felipe Tonin kaj Helen Winkler

**ĈIUJ RAJTOJ DE TIU ĈI ELDONO REZERVITAJ DE ELDONEJO ELEVAÇÃO:** Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brasil [Brazilo] • CEP 01134-050 • Tel.: (+55 11) 3225-4969 • www.bonavolo.com




## Pripenso de BONA VOLO


Amo, Harmonio, Solidareco, spirito de Justeco lige kun Bonkoreco, neniam kun venĝo; Libereco kun respekto al ĉiuj ceteraj Homoj; Vereco sen socia, politika, filozofia, religia aŭ scienca fanatikeco; helpado al suferantoj korpe aŭ anime; Politiko kaj Ekonomiko, kune kun virtoj de Ĝusteco kaj Grandanimeco; Instruado, Edukado, Reedukado, laŭ Ekumena Frateco; sekve, ĉio, kio en Paco aŭ en milito plifortigas homojn sur la Tero kaj en la Nevidebla Mondo, kiu ne estas ia abstraktaĵo, konsistigas la kompletan koncepton de ideologio por la Civitano de Spirito: **Karitato**, tio estas, morala etoso, kiun ni devas travivi, kiel estuloj vere civilizitaj.


**Paiva Netto**

Elprenaĵo de la libro *Urĝas Reeduki!*, de aŭtoreco de la verkisto Paiva Netto, vendĉampiono en la 21a Internacia Libro-Foiro de San-Paŭlo, en 2010.

**4 Mesaĝo de Paiva Netto** | Homa maŝino kaj oleo de sento
**10 Leteroj kaj retpoŝtoj** | Esperantistoj skribas al BONA VOLO
**12 Registro** | Preĝo kay Solidareco
**16 Literaturo** | Internacia lanĉo
**18 Komunikiloj** | LBV kaj Esperanto kumplek tas la manojn
**20 Kulturo** | Ne forgesu Robinson Crusoe!
**22 Kovrilo** | Idealo de kunfratiĝo de la Popoloj
**26 Esperanto tra la mondo** | Esperanta Novaĵservo
**28 Edukado** | Allogaĵo de la Plena Civitaneco per Ekumena Edukado
**38 Junula Agado LBV** | Duona jarcento da agado en la Bono
**40 Soldatetoj de Dio** | Bona Volo por ŝanĝi kutimojn










# Homa maŝino kaj oleo de sento

João Preda



José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radiopreleganto, komponisto kaj poeto. Li naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV). Estas aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Internacia, Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI–Inter), ano de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj de Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radiokomunikantoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Beletra Akademio en Centra Brazilo kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Edukado estas ĉiam aktuala temo. Urĝas, ke ni ĉiuj disvastigu kaj alfrontu ĝin, kiel sekuran vojon, kiu mallongigas la socian distancon inter klasoj. Ĝi estas ankaŭ efika rimedo kontraŭ perforto, krimado, malsanoj kaj ĉio ajn, kio nuligas sanan kreskadon de popolo.

Responde al peto de amikoj, jen mi ĉi tie prezentas pecojn de prelego, kiun mi faris je la 9-a de marto 2010, en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, kun partopreno per interreto de pluraj lokoj en Brazilo kaj eksterlande. Inter la traktitaj temoj, troviĝis la Pedagogio de Dio, kiun rekomendis **Alziro Zarur** (1914-1979), kiun poste ni elvolvis al socieduka tezo de Legio de Bona Volo, celanta kunigi la kognan evoluadon de lernanto al kulturo de plurobla respekto; tial, ĉiam kun Ekumena Spiritualeco, kaj pri tio mi al vi parolas ofte. De tio rezultis responde Pedagogio de Amo kaj tiu de Ekumena Civitano, por gejunuloj kaj plenkreskuloj.

Arkivo BV



Alziro Zarur

## Ĉi tie oni studas.
## Formiĝas Cerbo kaj Koro.

Penso de Paiva Netto, el la jardeko post 1970, montrata ĉe lernejoj de LBV en Brazilo kaj eksterlande, ekde la inaŭguro de Infanvartejo Jesuo, en San-Paŭlo/SP, je la 25-a de januaro 1986.




João Periotto

Arkivo BV


▶ Montevideo/Urugvajo

Mônica Mendes


▶ Belo Horizonte/Brazilo

Arkivo BV


▶ Belém/Brazilo

Leilla Tonin


▶ La-Pazo/Bolivio

Vivian Ribeiro Ferreira



Improvize, mi parolis pri tiu temo, dirante, ke ne sufiĉas kleriĝi pri raciaj homaj aferoj. Laŭ tio, kion mi emfazis en februaro 1984, kiam mi parolis al virinoj okupitaj pri agadoj de LBV, kaj poste per ĵurnalo *Folha de S.Paulo,* je la 27-a de julio 1986: Instruado, laŭ ni, estas tiu ricevata ĉe lernejo, ĉe kolegio, ĉe universitato aŭ ie ajn, kiun oni devas ligi al la hejmo, en formo de Edukado. Tia ligo estas nepre necesa. Sen Instruado kaj Edukado ne eblas progreso. Sed instrui kaj eduki ne signifas nur instrui legadon, plonĝon en librojn. Super ĉio, temas pri prilumado de inteligenteco por harmoniaj funkcioj de la Homo en socio. Cetere, socio kaj registaro devas konstante unuiĝi por starigi strukturon, kiu efektive formu ian pli bonan patrolandon, ian pli feliĉan mondon. Ju pli malbona la instruado, des pli malbona la estonteco. Do, instrui ne signifas nur transdoni abocon de surtera scienco, eĉ se plej altan Matematikon, Fizikon, Ĥemion, Astronomion, k.t.p.. Ĉar se ne troviĝas bona nutraĵo por la Animo — prilumata per spiritualigo, kiu signifas pli ol eduki, sed reeduki — , tiam tia radikalinstrua lernado kondukos la Homon, sen tia bona nutraĵo, al pensoj kaj agoj pli kaj pli detruaj. Eduki signifas transformi, reeduki, sub aŭspicioj de Paco, de Amo kaj de Justeco, vivigata per Bonkoreco kaj sekve ĝi signifas sublimigon de homa karaktero.

Sen Instruado, kaj precipe sen Edukado ne eblas morgaŭo. Ĉu vi memoras Planon Marshall, por

Eŭropo, pri kiu mi jam parolis al vi plurfoje? Oni elstarigu Germanujon, en Okcidento, kaj Japanujon, en Azio, kun **MacArthur** (1880-1964), kiuj vigle releviĝis. Tamen, la produktado de tiuj du landoj, kaj ankaŭ de multaj aliaj, bankrotus dum tiu periodo kaj dum iu ajn alia periodo, se oni ne preparus generacion, por kiu klerigado estis profunda, taŭga kiel fundamento al postaj generacioj.

## Amo kaj Respekto

Oni multe plendas pri perforto ĉe lernejoj, sed se lernanto tien venas por lerni plivastigi sian rezonkapablon por fariĝi kapabla ensorbi la bezonatajn lecionojn laŭ teknika sciakiro, **paralele oni devas nepre konsideri plej taŭgan zorgon pri sentoj.**

Por infanoj, amo, kaj por junuloj, respekto similas funkciantan maŝinon: unuflanke la dentradoj, nome la menso, la logiko; aliflanke, la Animo, la sentemo, kiu evitas, ke ni fariĝu ĉiam pli sovaĝaj! Nu, la radodentoj sinsekve renkontiĝas kaj movas la maŝinon. Tamen, se Vi ne aldonas al tiu sistemo oleon de Frateco, de Solidareco, de Mizerikordo, de Kompatemo, ĉio paneas, blokiĝas, rustiĝas kaj fiaskas!

## Precipa tasko

Ĉu vi iam vidis bone funkciantan maŝinon, se ĝi ne estas taŭge oleita? Kio estas Homaro? Ĝi estas ia eksterordinara aparato, kiun oni devas olei per sento, kiu venas de Dio, se oni komprenas Lin kiel Amon, do Karitaton. Kaj ĉu vi scias, kiuj estas ĝiaj

Vinicius Ramão



▶ Curitiba/Brazilo

Leilla Tonin



▶ Recife/Brazilo

Arkivo BV



▶ Bonaero/Argentino

School Pictures



▶ San-Paŭlo/Brazilo

dentradoj? **Ni mem!**, kiuj ne estas iaj rustiĝemaj metalpecoj, krom se ni infektiĝis de senmoviganta nenifarado.

Jen estas nia precipa tasko: kleriĝi, edukiĝi, reedukiĝi, por efike instrui, eduki, reeduki.

**Nome, trafa Edukado liberigas. Kaj kun Ekumena Spiritualeco, ĝi sublimigas.**

## Vidu trans intelekto

Cida Linares



Paulo Parisi

En intervjuo, kiun mi donis al veterana itala ĵurnalisto, de longe loĝanta en Brazilo, **Paulo Rappoccio Parisi**, je la 10-a de oktobro 1981, mi diris, ke ĉe Legio de Bona Volo ni bataladas por Edukado kaj Klerigado ligitaj al lumiganta agado de Ekumena Spiritualeco. Cetere, por sublime kunigi **lumojn de intelekto kaj Sunon de Spirita Kono**, LBV pionire antaŭeniras por venigi en lernoĉambrojn – pro tio ni solidigas Pedagogion de Ekumena Civitano, aŭ Solidara Civitano, kaj Pedagogion de Bonaj Sentoj, de Amo (por infanoj ĉe infanvartejoj de LBV), ĉe ĝiaj instruorganoj – kapabligon pri etika komprenpovo, cele al la Eterna Vivo, kaj same grave: apliki tion al konkretaj defioj de surtera

André Fernandes

▶ San-Paŭlo/Brazilo

Lucian Fagundes

▶ Rio-de-Ĵanejro/Brazilo


Débora Verdan

▶ Campina Grande/Brazilo

Ariovaldo Oliviera


▶ Natal/Brazilo

vivo. Kiel ĉe kartezia geometrio, necesas, ke materia Edukado (ikso-koordinato aŭ koordinato de abscisoj) renkontu scion venintan el plej altaj sferoj de Dia Saĝo, nome el Amo (ipsilono-koordinato, aŭ koordinato de ordinatoj). Saĝulo komprenas kaj uzas inteligenton, intelekton, teknikan specifan konon profite al Homoj.

Arkivo BV

Albert Einstein

Tamen, ekzistas tiom da tre inteligentaj homoj, kiuj fiagadas en ĉi tiu mondo. Ĉu estas saĝa tiu, kiu damaĝas sian similulon? Ne! **Ni do akiru Saĝecon kun Jesuo, kiu estis Majstro en Israelo, kaj post centoj da jaroj unu el la plej respektataj profetoj en Islamo, lavis la piedojn de Siaj fratoj**, laŭ raporto de **Johano,** en la 13-a ĉapitro de la kvara kanonika Evangelio. **Salomono**, en Sentencoj, 16:16, skribis: *"Akiro de saĝeco estas multe pli bona ol oro; kaj akiro de prudento preferinda ol arĝento."*

Tiam ni iros laŭ ĝusta vojo, por prilumi la Spiriton per **Lumo, kiu ne estigas ombrojn: lumo de Dio**, se oni komprenas Lin kiel Amon, mi ripetas, neniam homforme, kion nepre kontraŭstaris **Albert Einstein** (1879-1955). Aŭ, por tiuj, kiuj ne kredas Lin, la lumo de noblaj sentoj, kiuj pravigas postvivadon de la homa raso, malgraŭ multaj jarcentoj da frenezo flanke de homoj, kiuj, larĝasence regis ĝin, ĉar ne nur loĝantoj en palacoj faras tion. (...) Ĉe la enirejo de Instituto pri Edukado de LBV, en la urbo San-Paŭlo, kaj ĉe ĝiaj lernejoj en Brazilo kaj eksterlande, oni legas klare: **Ĉi tie oni studas. Formiĝas Cerbo kaj Koro**. Unu bezonas la alian.

Arkivo BV

Emmanuel

Arkivo BV

Francisco Xavier

Skribis **Emmanuel**, en ĉapitro "Infanoj", en sia verko *Vivanta Fonto*, psikografie skribita de **Francisco Cândido Xavier** (1910-2002), inspirite de la versiklo 10-a de la Evangelio de Jesuo, laŭ **Mateo**, ĉapitro 18-a: *"Gardu vin, ke vi ne malestimu unu el tiuj malgranduloj..."*:

## "Infanoj

Emmanuel

*"Kiam Jesuo rekomendis al ni, ke ni ne malestimu la malgrandulojn, Li celis, ke ni zorgu ne nur pri pano kaj vesto.*

*"Ne sufiĉas nutri etajn malsatantajn buŝojn aŭ vesti frostiĝintajn korpetojn. Nepre necesas morala ŝirmado, kiu garantiu al renaskiĝanta spirito taŭgan etoson por ties sublimado.*

*"Multaj gepatroj liveras materian komforton al siaj gefiloj, sed bedaŭrinde forlasas ilian animon.*

*"(...)*

*"Ne forlasu do infanon, fordonante ĝin al impulsoj de besteca naturo.*

*"(...)*

*"Telero da manĝaĵo estas grava por elvolviĝado de homo, sed oni ne rajtas forgesi, ke 'ne nur per pano la homo vivas'.*

*"Ni memoru pri nutrado de infanoj per niaj agoj kaj ekzemploj, admonoj kaj alĝustigoj, en oportuna tempo, ĉar morala neapogado de infano, je nuntempaj taskoj, estus kondamni ĝin al memmalestimo rilate ĝian estontan agadon".*

Koncerne tion, per dokumento, kiun ni sendis al UN, okaze de Konferenco pri Virina Statuso, en marto 2009, mi asertis denove, ke **stabileco en la mondo komenciĝas ĉe infana koro**. Pro tio, en LBV, de multaj jaroj, ni uzas Pedagogion de Amo kaj Pedagogion de Ekumena Civitano. (...) La amo, kiu inspiras nian pedagogian vojon, se oni prenas ĝin laŭ plej alta senco, estas ne nur alta sento de Animo, sed politika strategio, same komprenata kiel plej alta inklino, konforme al Socia Justeco, kiel ia strategio por postvivado por individuoj, popoloj, nacioj. Homoj — do civitanoj, interalie esperplenaj gejunuloj — estas multe pli ol sako da ostoj, muskoloj, nervoj, sango. Ili amas kaj suferas. Ili revas, deziras, konstruas, elreviĝas, kaj malgraŭ ĉio ili plu iradas, ili antaŭeniradas... Ili meritas, krom leĝoj, respekton, tiel ke leĝoj neniam konsistigu obskurajn privilegiojn, sed estu plenumataj favore al ĉiuj (...).

Clayton Ferreira



▶Joinville/Brazilo




▶Campo Grande/Brazilo

Arkivo BV



▶Cuiabá/Brazilo



▶Braziljo/Brazilo





# Danko al ĉiuj samideanoj

**Pro neebleco publikigi ĉiujn retpoŝtajn mesaĝojn kaj leterojn senditajn al la ĉefgvidanto de LBV kaj al revuo BONA VOLO, ni dankas, per ĉi tiu eldono, kelkajn el ili kiel maniero reprezenti ĉiujn:**

**(Albanio)** Selimi Bardhyl; **(Argentino)** Abel Weiner, Roberto Sartor, Ruben Diaconu; **(Armenio)** Susanna Baghdasaryan; **(Aŭstralio)** Bob Felby, Jennifer Bishop, Max Wearing; **(Belgio)** Heidi Goes; **(Bulgario)** Kanjo Mitev Kanev; **(Brazilo)** Antônio Carlos de Martins Mello, Elísia Martins de Oliveira, Evandro Cabloco, Jair Salles, Marcia B. Oliveira, Paulo Sergio Viana, Elisia e José Saraiva Matos; **(Burundo)** Ntahonsigaye Hassano, Waldir A. Silvestre; **(Ĉeĥio)** Jan Werner, Jindřiška Drahotová, Petro Chrdle; **(Ĉinio)** Li Jianhua, Xiong Zhouxuan; **(Demokratika Respubliko de Kongo)** Nelly Masemi, Jean Bosco Malanda; **(Francio)** Jeanne Schertzer; **(Germanio)** Ronald Schindler; **(Hungario)** Adrienne Pásztor; **(Italio)** Gianfranco Polerani, Laura Gentili; **(Japanio)** Aihara Misako, Ding ji, Etsuo Miyoshi, Hori Jasuo, Riichi Karibe, Ŝigeki Maeda, Tahira Masako, Yamamoto Sintarô; **(Kanado)** Raymond Brisebois; **(Komoroj)** Ali Mze Mihidjahi; **(Meksiko)** Joaquín Rosillo, José Aparecido; **(Nepalo)** Himalal Parajuli; **(Niĝerio)** Gabrielo O. Oshó-Davies; **(Pakistano)** Saeed Ahmad Farani; **(Pollando)** Antonio Jerzy; **(Rumanio)** Jolanda Józsi, Júlia Sigmond; **(Slovakio)** Magdaléna Feifičová; **(Svisio)** Claude Gacond; **(Taĝikio)** Firdaŭs Ŝukurov; **(Tanzanio)** Jayrous Eliakimu **(Turkio)** Can Zamur; **(Togo)** Aholou; **(Usono)** Neil Blonstein, Ronaldo Glossop.



Fotokopio de Portalo Bona Volo:
www.bonavolo.com

Gratulon pro la altnivela paĝo-retejo en Esperanto, kiu certe bone servos ne nur informadon pri Brazilo, sed ankaŭ pri la agado de Legio de Bona Volo. Mi diskonigos la paĝon inter miaj geamikoj.

*(Andreo Pettyn, Pollando)*

Mi estas tre kontenta pro viaj grandegaj helpoj kiujn vi faras al la suferantaj popoloj.

*(Antoine Gomis, Senegalo)*

Karaj gesamideanoj de Legio de Bona Volo, Saluton. Mi volas danki vin pro la sendo rete de la revuo en Esperanto. Bonegaj artikoloj kaj bonega revuo. Mi gratulas vin. Tutkore.

*(Emilio Sanz, Hispanio)*

Mi kun ĝojego kaj sincereco skribas al vi por vin gratuli pri via homama agado. Tio estas laŭdinda agado, kaj mi preĝas por ke la Plej Pontenca vin gvidu, donu al vi saĝon kaj rimedojn por sukcese plenumi vian noblan taskon. Ke la fajro de Legio de Bona Volo lumu por ĉiam.

*(Arlain Kizeyidioko Mayinda, Demokratika Respubliko de Kongo)*

Mi ĵus vizitis vian paĝon [Portalo Bona Volo] kaj gratulas vin pro la bonega laboro. Mi deziras al vi sukcesplenan E-agadon.

*(Gbeglo Koffi, Togo)*

Mi multe legis pri Paiva Netto kaj miras pro liaj realigadoj ĉu socialaj ĉu ekumenaj ĉu bonfaraj.

*(Serio Boschin, Italio)*

Ni kaptas la okazon danki pro la bela akrostiko, kiun ni ricevis de s-ro **Jorge das Neves**, esperantisto kaj multjara amiko de Legio de Bona Volo:



## Homaranismo

**H**odiaŭ ni parolu sen mistero,
**O**omoto praktikas sur la Tero
**M**ovadon Ekumenan: Esperanto
**A**peras kiel frata idiomo...
**R**espondas LBV per brila kanto.
**A**me parolas ĝuste homa homo,
**N**enia baro ĉi. Dank' al facilo
**I**nternacia vera kunfratiĝo!
**S**alutas Paiva Netto el Brazilo
**M**ovadon tre similan kun prestiĝo
**O**omoto kaj LBV kun brilo.

## Legu sube kelkajn el la manifestiĝoj venintaj pere de sociaj retejoj:

### TWITTER

@tonyodb Toño del Barrio
Mi konsentas RT: @BonaVolo #Esperanto estas paca ponto.

@jagitakesxi JAGI Takeŝi
Esperantaj Novaĵoj de Jagi is out! http://bit.ly/dO36sl ► Top stories today via @jakependragon @bonavolo @leo_olivarbo @kienli

@purgly Jorge Purgly
@BonaVolo Mi petas al vi permeson por publiki la revuo Bona Volo cxe http://www.facebook.com/pages/Esperanto/103469783058482

@Esperanto_feed Esperanto feed
The Esperanto feed Daily is out! http://bit.ly/fB2wzo ► Top stories today via @bonavolo @fantomarko @esperanto_feed @limako @jagitakesxi

### FACEBOOK

Saluton! :) Mi tre ĝojas por la Bona Volo paĝo en Facebook! ***(Aldona Ubik, Germanio)***

Ege pasinte mi ekkonis Viajn aktivulojn el Boa Vontade dum la esperanta Kongreso en Varsovio. LBV estas tre grava kaj tre bona christianpopola organizaĵo. Salutoj el Pollando al ĉiuj niaj geamokoj! ***(Andrzej Olejarz, Pollando)***

Kompreneble, Bona Volo estas esprimo al paco kaj frateco. Brakumon! ***(Sebastião Pimentel de Assis)***

Elkore mi dankas vin cxion! Mi estas Pastoro ekumenika/brakumisto je "Eklezio de Kristo - Komunumo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj" en Rio de Janeiro. Mi amas LBV ĉar ni havas la saman Spirito de Senlima Ekumenismo. Pacon kaj Bonon!! ***(José Aparecido, Brasil)***

Saluton el Katalunio. Estas granda plezuro ke vi aldonis min al via amikaro. Dankon!!! ***(Joan Inglada Roig)***

Saluton el Santos, Brazilo. Dankon! Tre sukceso en via laboro!!! Mi tre ĝojas koni vin. ***(Maria De Lourdes Ferreira)***

Saluton el Meksiko! Mi estas ĝoja pro via amikeco! Dankon! ***(Amir Gómez Cruz)***

**Sekvu nin ĉe Twitter kaj ŝatu nian paĝon ĉe Facebook!**

# Preĝo kaj Solidareco

Janine Martins



José Gonçalo




## TBV okazigas Ekumenan Agon omaĝe al la viktimoj de la tragedio en Japanio

Anoj de LBV, religiestroj kaj simpatiantoj de Legio de Bona Volo okazigis la 18an de marto, en la Templo de Paco, en Braziljo/DF, Brazilo, Ekumenan Agon al la viktimoj de la forta tertremo kaj de cunamo, kiuj trafis la nordorienton de Japanio, la 11an de marto.

En la ceremonio, realigata en la Navo de la Templo de Bona Volo (TBV), ĉeestis la budhanaj monaĥoj **Sato** kaj **Ymura** kaj la direktoro de Oomoto Internacia, prof-ro **Ŝigeki Maeda**, krom reprezentantoj de Bahaa komunumo, de Iniciato por Unuiĝintaj Religioj (URI) kaj de fratoj esperantistoj.

La reprezentanto-predikanto de la Religio de Dio, **Jayme Bertolin**, kiu gvidis la Ekumenan Agon, legis la artikolon "Ekzemplo pri superado", de la ĵurnalisto kaj radiokronikisto Paiva Netto, fondinto de TBV, publikigitan en centoj da gazetoj, revuoj kaj retejoj, enlande kaj alilande. La Ekumena Koruso de TBV havigis momentojn de




André Fernandes

emocio dum prezento de muzikaĵoj aludantaj Pacon, tiel venigante konsolon al la koroj.

Sin direktante al la ĉeestantoj, prof-ro Ŝigeki Maeda esprimis sian apogon kaj senton de frateco al tiuj kiuj travivas tiun momenton de granda defio; krome, li dankis pro la okazigo de la ceremonio en tiu ekumena medio.


Kiel reprezentanto de la Budhisma Templo Pura Tero, la monaĥo Sato diris: *"Mi volas danki nome de la japana popolo, miaj antaŭuloj, kaj nome ankaŭ de la ĉeestantaj religioj, tiun iniciaton de LBV kun la tiel signifa ĉeesto de homoj solidaraj al la sufero de la japana popolo".*



*El Popola Ĉinio* diskonigas la artikolon "Ekzemplo pri superado", de la ĵurnalisto Paiva Netto.

Post ekkanto de mantro, li komentis: *"La preĝo, direktata al la japanoj kaj iliaj familianoj postvivantaj tiun katastrofon, ankaŭ estas ia danko pro la instruoj, kiujn tiu okazintaĵo portas al ni. Certe la japana popolo leviĝos unu plian fojon. Kiel ĉiuj scias, Japanio (...) jam travivis similajn situaciojn. Kaj kiel la Frato Paiva memorigis, ĝi superis ĉiujn ilin".*


Al ĉiu kunvenantoj oni donacis blankan rozon. Ĉe la ferma solenaĵo, dum la ekumena preĝo *Patronia*, la floroj estis levitaj kiel simbola gesto por memorigi kaj omaĝi la viktimojn kaj iliajn familianojn. Sekve, la rozoj estis ĝentile metitaj sur la Sanktan Kuvon, antaŭ la Trono kaj Altaro de Dio.


Persona arkivo
Aparecida Tokuda

La ceremonio estis elsendita de TV Globo Brasília kaj diskonigata de kelkaj amaskomunikiloj, kiel *Jornal de Brasília*, *Band TV* kaj *TV Brasília*, kaj ankaŭ pere de la retejoj maisbrasilia.com, correioweb.com.br, clicabrasilia.com.br kaj rinaldogoodnews.blogspot.com.




## Komunikado je servo de la Bono


Persona arkivo
Valder Tokuda

El Japanio, **Aparecida Tokuda**, loĝanta en Aikawa-machi, landinterne de la Gubernio Kanagawa, informis ke la preĝoj kaj vortoj de Fido kaj kuraĝigo el la brazilanoj estas grava subteno por la enlandanoj. *"Super ĉio, ni devas havas multe da Fido je Dio. En nia domo, mi kaj mia edzo, **Valder Tokuda**, ĉiam aŭskultas Superreton Bona Volo. Pere de interreto (www.bonavolo.com), ni akompanas [la elsendon de LBV] 24 horojn, kaj tio multe kuraĝigas nin. Tre dankon pro la preĝoj! Vi estas tie en Brazilo, ni ĉi tie en Japanio, sed la Povo de Dio estas unu sola. Kiam niaj pensoj estas kunigitaj, tiu distanco malaperas, ĉar la vibro tiel fortas ke ŝajne ni kune ĉeestas"*, diris Aparecida.


Persona arkivo
Andrea Brujnolo kaj sia patro, João Tatsuo Tsuchiya

Ankaŭ el Japanio alvenas danko de s-ro **Etsuo Miyoshi**, honora prezidanto de Swany Corporation, en la urbo Higashikagawa, en Gubernio Kagawa, kiu aldonis al sia paĝo en Facebook la ligilon al la artikolo "Ekzemplo pri superado". S-ino **Tahira Masako**, de la Internacia Fako de la Japana Esperanto-Instituto, en Kioto, estas alia fratino kiu afable respondas al la mesaĝo de la direktoro-prezidanto de LBV: *"Dankon pro via preĝado kuraĝigi japanojn, suferantajn en sinsekvaj katastrofoj. (...) Mi tre esperas, ke iam venos paca vivo al la japana popolo".*


Persona arkivo
Etsuo Miyoshi


Arkivo BV
Tahira Masako

El la brazila urbo Curitiba, en la subŝtato Paranao, venas la atesto de la junulino **Andrea Kaori Tsuchiya Brujnolo** pri la diskoniteco de la artikolo de la ĵurnalisto Paiva Netto: *"Meze de tiom da tumulto en la monda scenejo, rezulte de lastaj okazintaĵoj en Japanio, la artikolo 'Ekzemplo pri superado', de la verkisto Paiva Netto, efikis sur min kiel balzamo tre konsola. Mi estas nepino de japanoj, flanke de mia patro, kaj min tre kortuŝis ĉio okazinta. Ĝuste pro tio ke tiu lando gastas miajn du gefratojn, **Flávio** kaj **Patrícia**, kiuj laboras kaj vivas tie kun siaj familioj. Danke al Dio ili bone fartas. Mia familio kaj mi dankas pro la belega mesaĝo, kiu invitas nin pensi pri la signifo de superado en nia vivo".*

Kaj konkludas Andrea: *"Mi finas per tiu penso de aŭtoreco de la Frato Paiva, kiun mi direktos al miaj gefratoj en Japanio: 'Sekuraj ni estas en la Dia Sekureco de la sekuraj manoj de Jesuo'.* Arigatô! *[Dankon!]".*

El la ĉefurbo San-Paŭlo, skribas patro **Dalmo Ribas**, psikologiisto, sacerdoto de Tendara

Fotoj: José Gonçalo







Monaĥoj Ymura kaj Sato, el la Budhisma Templo Pura Tero, la respektinda prof-ro Ŝigeki Maeda, direktoro de Oomoto Internacia, kaj la reprezentanto-predikanto de Religio de Dio, Jayme Bertolin.



La publiko akompanas la Ekumenan Preĝon *Patronia*

Unuiĝo de Umbando kaj Kandombleo en Brazilo kaj membro de Iniciato por Unuiĝintaj Religioj (URI): *“Tre oportunaj la konsideroj de la Frato Paiva Netto pri la japana tragedio, kiu efektive estas tragedio de la Homaro. Kurioze, spektante la filmon* Revoj, *de* ***Akira Kurosawa****, mi alfrontis intrigon de rakontoj, kiu estas antaŭvido de tiu okazonta fatalo. Substrekindas ke la filmo datiĝas je 1990”.*



Arkivo BV


Kurenai Deguĉi



Elias Paulo

Dalmo Ribas

El la brazila ĉefurbo, ankaŭ prof-ro Maeda komentis per retmesaĝo pri la artikolo “Ekzemplo pri superado”, kiun li tradukis al la japana kaj sendis al la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto, **Kurenai Deguĉi**, en la Gubernio Kioto: *“Majstrino legis kaj tre dankis kaj ĝojis la koron de Frato Paiva kiu kun amema koro zorgas pri Japanio kaj japanojn. Majstrino petis min elkore transdoni ŝian saluton al sinjoro Paiva Netto. Koncerne ankaŭ al la preĝkunvenon, kiu okazis en Piramido [de Templo de Bona Volo], ŝi petis min transdoni sian dankemon al la koncernantoj de LBV”.*




Arkivo BV

Ombretta Sacco

Ankaŭ el ĉefurbo San-Paŭlo, s-ino **Ombretta Gori Sacco**, vidvino de la karmemora **Teodoro Lausi Sacco**, kiu prezidis la Spiritisman Federacion de la Subŝtato San-Paŭlo (FEESP), komentas: *“Frato Paiva Netto: tre oportuna via teksto ‘Ekzemplo pri superado’. Nia spiritisma grupo kuniĝas al la tuta Homaro por preĝi al la fratoj en tiel malĝoja momento. Ke Dio, en Sia Senlima Boneco, venigu forton al tiu popolo tiel valora. Ni preĝe kuniĝu al ĉiuj ili, la enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj. Ke Jesuo lumigu ilin ĉiam! Fratajn brakumojn”.*

# Internacia lanĉo





**La furoraĵo de Paiva Netto *Meditadoj el la Animo* jam estas disponebla en Esperanto.**

Brazila ĵurnalisto kaj verkisto kun pli ol 4 milionoj da libroj venditaj, Paiva Netto lanĉas la 9an de julio, dum la 8a Tutamerika Kongreso de Esperanto, la atendatan furoraĵon *Meditadoj el la Animo*, tradukitan al Esperanto fare de Eldonejo Elevação. Grava instiganto por diskonigado de la internacia lingvo, Paiva Netto ricevis la distingaĵon "Arĝenta Plato" de Universala Esperanto-Asocio (UEA), okaze de la inaŭguro de la Templo de Bona Volo (TBV), en oktobro 1989. Tiu elstara premio troviĝas en ekspono en la Memorigejo omaĝanta la ĉefgvidanton de LBV, unu el la ĉambroj de la Monumento.

Pli ol 400 mil ekzempleroj de la verko jam disvendiĝis en Brazilo kaj en Portugalio, kaj ĝi fariĝis atentigaĵo en la ĉefaj mondaj literaturaj eventoj, kiel en la 80a Libro-Foiro en la

## Aŭtoro



Aŭtoro de pluraj furoraj libroj, kun pli ol 4 milionoj da venditaj ekzempleroj, kaj krome verkas por plej gravaj ĵurnaloj kaj revuoj en Brazilo kaj en eksterlando. Pri tiu aspekto de lia personeco, la usona verkisto Errol Lincoln Uys rimarkigis: *"Kiel praktika homo, Paiva Netto ne forgesas sian poetan animon"*. Laŭ difino de la eminenta profesoro, juristo kaj traktatisto José Cretella Júnior, *"li estas eminenta stilisto, ĉiam informita pri novaĵoj"*. Kaj laŭ la opinio de la majstro de profesoroj Moacir C. Lopes (1927-2010), *"li estas tre talenta verkisto"*.

portugalia urbo Porto, en 2010. Per tio, legantoj el la antikva kontinento estis allogitaj de la speciala eldono lanĉita de Eldonejo Pergaminho.

Je ĉiu pripenso, la aŭtoro havigas instrumentojn por reakiri la konsciencon de nia interna mio kaj instigas nin serĉi la Veron. Prezentitaj per simpla maniero, sed profunde, tiuj gravaj instruoj kortuŝas la leganton. Tial, *Meditadoj el la Animo* helpas al la leganto kompreni sian spiritan esencon kaj sian rolon en ĉi tiu mondo.

La prezenton de ĉi tiu esperanta versio subskribas la pola ĵurnalisto kaj dokumenta filmisto **Roman Dobrzyński**, iama vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio (1989-92). Laŭ li, la aŭtoro de *Meditadoj el la Animo*, kaj de pluraj aliaj titoloj same inspiritaj, estas laŭdinda.

Plu diras la samideana amiko: *"Paiva Netto estas homo, kiu disvastigas Fratan Amon kaj Ekumenismon sen landlimoj kiel veran vojon por atingi la tutmondan Pacon, kaj tiaj konceptoj elstaras en ĉi tiu nuna libro. De tio rezultas la antaŭenpuŝo de la aŭtoro de la verko al la internacia lingvo, precize ĉar tre similas ĝia ideologio al tiu de LBV, nome unuigi la naciojn per tio, kio estas plej alta en la Spirito de ĉiu el ĝiaj enloĝantoj, kaj flankenlasi ĉian kaŭzon por disiĝo aŭ diskriminacio"*.

### Literaturo kiu bonfaras

Kunlige al supra titolo, menciindas ankoraŭ la multjara vivsperto de la aŭtoro kaj lia facileco trafe prezenti sian penson. El sia verkaro distingiĝas la tri volumoj de la kolekto *Apokalipso de Jesuo por la Kore Simplaj* (*La Profetaĵoj sen Mistero, Ni ĉiuj estas Profetoj* kaj *Apokalipso sen timo*). La aparta kaj ĝisdata maniero kiel la aŭtoro komentas pri la temoj aperantaj en la fina parto de la Sankta Biblio estas sukcesa: pli ol 1,5 miliono da ekzempleroj estis venditaj.

Indas reliefigi ankoraŭ ke, en 1998, granda estis la akcepto de *La Profetaĵoj sen Mistero* en plej vizitataj enlandaj kaj alilandaj eventoj pri literaturo, kiel tiu de la 50a Libro-Foiro en Frankfurto, Germanio, kaj tiu de Liber'98 — 16a Internacia Libro-Foiro de Hispanio, en Barcelono. Aliaj gravaj verkoj de la aŭtoro estas *Kiel Venki la Suferon* kaj *Urĝas Reeduki!*, rekordo de vendo dum la 21a Internacia Libro-Foiro de San-Paŭlo, Brazilo, en 2010.


***Meditadoj el la Animo*** **disponeblas ankaŭ kiel e-libro.**
**Rezervu tuj la vian! Skribu al <esperanto@bonavolo.com>.**
**Paĝokvanto: 256**
**Prezo de la libro: R$ 16,00 + Sendokosto**


# LBV kaj Esperanto

Jam de pli ol kvin jardekoj, Esperanto kalkulas je la apogo de Legio de Bona Volo (LBV), kiu pere de la internacia lingvo estas portinta al la mondo bonkvalitan informon pri sociaj, kulturaj kaj edukaj temoj, ĉiam analizitaj per la prismo de la Ekumena Spiritualeco. Per tiu sekcio, ni kore dankas la noblan iniciaton de ĉiuj samideanaj amikoj kiuj kunlaboras kun LBV por plivastigo de tiuj ekumenaj idealoj de paco kaj frata amo. Legu kelkajn tiajn diskonigojn:



**GERMANIO**
**Diskoniganto:** Ronald Schindler
**Nomo:** brandenburgio.de
**Diskonigilo:** Interreto


La prezidanto de Esperanto-Asocio de Berlin-Brandenburgio, en Germanio, Ronald Schindler, aperigis en la sekcio "Urĝaj atentigoj", de la asocia retejo, ligilon por la artikolo de la direktoro-prezidanto de LBV, Paiva Netto, titolita "Ekzemplo pri superado", dediĉita al la viktimoj de la tertremo kaj cumano, kiuj atingis Japanion.







**BULGARIO**
**Diskoniganto:** Georgi Mihalkov
**Nomo:** Bulgara Esperanto-Asocio
**Diskonigilo:** Bulteno

La marta eldono de la oficiala bulteno de Bulgara Esperanto-Asocio faris omaĝon al LBV per publikigo de artikolo pri la pionira laboro de la brazila Institucio, reliefigante tuj en la titolo ĝian devizon: "la koro kiu pulsas por la Homaro jam de 60 jaroj".








**ĈINIO kaj JAPANIO**
**Diskonigantoj:** Li Jianhua kaj Etsuo Miyoshi
**Nomoj:** *El Popola Ĉinio* kaj Facebook
**Diskonigilo:** Interreto

Pluan fojon la artikolo de la ĵurnalisto Paiva Netto "Ekzemplo pri superado", omaĝe al la viktimoj de la tertremoj en Japanio, estis diskonigata en la monda esperantista gazetaro. Ĉi-foje la diskonigantoj estis s-ro Li Jianhua, per *El Popola Ĉinio*, kaj la japana esperantisto Etsuo Miyoshi, pere de sia paĝo ĉe Facebook, pro la granda kortuŝo, kiu tiu natura fenomeno kaŭzis en la tuta mondo.






# kunplektas la manojn



**AŬSTRALIO**
**Diskoniganto:** Robert Felby
**Nomo:** *Tamen Plu*
**Diskonigilo:** Bulteno
Per sia maja eldono, la aŭstralia bulteno *Tamen Plu* aperigis artikolon de la ĵurnalisto Paiva Netto "Ekzemplo pri superado", omaĝe al la familioj kaj viktimoj de la fortaj tertremoj, kiuj atingis Japanion, per kiu la aŭtoro substrekas: "En krizaj momentoj forĝiĝas la grandaj karakteroj kaj aperas la plej potencaj nacioj".



**ĈEĤIO**
**Diskoniganto:** Esperanto-Muzeo en Svitavy
**Nomo:** Ipernity
**Diskonigilo:** Interreto
La blogo de la Esperanto-Muzeo en Svitavy aperigis en sia fotogalerio bildon de la Templo de Bona Volo, la Ekumena Templo de LBV, situanta en Braziljo, faksimilon de la Portalo Bona Volo <www.bonavolo.com> kaj fotojn kun publikigaĵoj en Esperanto pri la brazila Institucio, kiujn la skipo de LBV portis al la 94a UK, okazinta en 2009, en Pollando.

**RUSIO**
**Nomo:** Esperanto_feed
**Diskonigilo:** Interreto
Same faris la blogo *Esperanto_feed*, en Sankta Petersburgo, kiu diskonigis la Ekumenan Agon de LBV, realigitan en la Templo de Bona Volo, la sepan tagon post la tertremoj de la 11a de marto, kiu invitis ĉiujn alsendi bonajn energiojn el ĉiuj anguloj de la Tero.




Ankaŭ Vi povas helpi al LBV plivastigi tiun ideon! Se vi laboras aŭ respondecas pri iu ajn tipo de amaskomunikilo, kontaktu nin pere de <esperanto@bonavolo.com> kaj diskonigu al ĉiuj viaj amikoj, retanoj, legantoj aŭ samideanoj.

Speciala por la Kongresego 2011

# Ne forgesu **Robinson Crusoe!**

**Paulo Sergio Viana**

Arkivo BV



Paulo Sergio Viana, kuracisto kaj tradukisto.

Eble neniu alia fabelo ilustras tiel bone la homan bezonon *kunvivi* kiel la fama romano de **Daniel Defoe**, Robinson Crusoe. En tiu klasika, universala rakonto, droninto troviĝas tute sola en fora insulo kaj lia ĉiutaga batalado celas konservi lian homecon, lian senton de aparteno al la mondo. Kompreneble, li frontas multajn problemojn, krom havigado de manĝo kaj akvo, kaj inter ili elstaras la tempo kaj la lingvo. Sen tiuj du elementoj, ne eblus gardi la menson. La tempon li markas per strekoj. Kiam li fine trovas homkunulon, sovaĝulon kun kiu li ekkunvivas, tre simbole li nomas lin "Vendredo". Kaj li tuj devas solvi la problemon de komunikado. Kiam leganto finas la lastan paĝon de tiu majstroverko, li neeviteble pensas: mi estas feliĉa, ke mi havas akvon, manĝon, lingvon kaj kunulojn.

Sen tiuj esencaj posedaĵoj, simple ne eblas vivi kaj ne multaj inter ni perceptas, ke tiu veraĵo validas por vivo individua kaj por vivo grupa, eĉ inter gentoj, inter nacioj. Homo bezonas siajn kunhomojn, familio bezonas aliajn familiojn, urbo aliajn urbojn, popolo aliajn popolojn. *"Neniu homo estas izolita insulo"* instruis **Hemingway**. Tion pruvas la progresoj en scienco, kiam oni vidas la interŝanĝadon de informoj inter la diversaj esplorlaboratorioj, ĉie; tion montras la mondpolitika evoluo, kiam oni redaktas la "Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj"; tion starigas humaneco, kiam oni vizitas en la urbo San-Paŭlo ekspozicion de skulptaĵoj de **Rodin**, rekte venintaj el Parizo; tion konstatas nia stomako, kiam ni vizitas vendejon kaj aĉetas supon "Campbell" kaj plezure manĝas ĝin.

Kiel malriĉa estus la vivo, se ni estus izolitaj! Tamen, ne temas nur pri politika, ekonomia integriĝo inter homoj kaj komunumoj. Temas ja pri io pli ampleksa kaj subtila. Temas pri integriĝo de kulturoj, kaj ni pensu, kiom da subjektiveco tiu termino enhavas. Kulturo ne estas nur sinonimo de klereco, kiel multaj pensas. Ĝi rilatas ankaŭ al moroj, kutimoj, nemateriaj valoroj, honorsento, historio, tradicioj, eĉ al la maniero kiel oni sidas ĉe tablo, salutas amikon aŭ kombas la harojn. Nome, temas pri tuta amaso da detaloj en la ĉiutaga vivmaniero, kiu distingas unu popolon de alia. Kaj plej kurioze: tiu unika tutaĵo estas mem la animo de tiu popolo. Konservi ĝin estas konservi la spiriton de tiu komunumo. Koni kaj respekti la spiriton de komunumo malsama ol nia propra komunumo estas plej alta manifestiĝo de civilizacio kaj homeco. Tial, interŝanĝo inter kulturoj faras homojn pli riĉaj, anime.

Sed, se ni revenas al Robinson Crusoe, por tio ni bezonas komunikilon, unuavice lingvon! Ne funkcias libroj, revuoj, radio, kino, televido, interreto, se oni ne havas komunan lingvon. Kaj plie: konservado de lokaj kulturoj inkluzivas konservadon de ties lingvoj! Sekve, ne eblas alia vojo, se oni deziras interŝanĝadon de homaj valoroj: la mondo bezonas komunan lingvon.

La amerika kontinento estas unu tia defio. Amerikanoj kutime trompiĝas, kiam ili pensas, ke en la Nova Mondo la komunikproblemo estas malpli granda. Jen grava eraro! Ni havas altajn barojn. Ne temas nur pli lingvoproblemo. Kvankam amerikanoj uzas relative malmultajn oficialajn lingvojn, tamen tiuj lingvoj estas ŝarĝitaj per amaso da emociaj pezaĵoj. Pro nia historio plena je koloniismaj, subpremaj, imperiismaj okazaĵoj, ni kvazaŭ dissplitiĝis en tute malsamecajn homgrupojn. Dum jarcentoj, okazis en Ameriko kruela hombuĉado, terura detruado de la naturo kaj de minoritataj kulturoj. En ĉi tiu tria jarmilo, nepre necesas, ke amerikanoj fine kunfratiĝu! Kaj por tio ni bezonas komunan grundon, unuavice komunan lingvon.

Sed kian lingvon amerikanoj bezonas? Pro nia historio de homa subpremado, niaj naciaj lingvoj akiris, vole nevole, ian ideologion, ian ligon kun sia eŭropa deveno. Krome, ekzistas en la tuta kontinento amaso da lingvoj minoritataj, kiuj restas forgesitaj de la plejmultaj homoj, sed kiuj nepre meritas respekton, ĉar ankaŭ ili havas sian ideologion, sian same riĉan animon. Ne eblas alia solvo: Ameriko urĝe bezonas neŭtralan, internacian lingvon, per kiu ĝi povu starigi novajn fundamentojn por interŝanĝado de aŭtentikaj homaj valoroj. Tiu lingvo jam ekzistas, kaj perfekte taŭgas por tia alta celo. Ĝi estas Esperanto, kun sia ideologio de paco, egaleco kaj respekto al ĉiuj kulturoj en la mondo. Per Esperanto, amerikanoj povos denove paroli inter si kiel kunfratoj, kaj eĉ komenci pli ambician projekton – la kulturan integriĝon ankaŭ kun aliaj kontinentoj. Tiel plenumiĝas la moderna profetaĵo, ke la mondo fariĝas iaspeca vilaĝo.

Jen kial la 8-a Tutamerika Kongreso de Esperanto (San-Paŭlo, 9-a ĝis 14-a de julio 2011) elektis kiel ĉeftemon "Procezoj de regiona integriĝo en la amerika kontinento: la rolo de Esperanto". Tre saĝe. Ni ĉiuj, kiuj jam konvinkiĝis pri la graveco de tiuj procesoj, devas ĉeesti kaj aktive partopreni. Ĉiu amerikano, kaj eĉ ĉiu mondcivitano havas ion por kontribui. Robinson Crusoe aprobus nin.





# Idealo de kunfratiĝo de la Popoloj

**Rafael Bruno**

Antaŭ malpli ol 20 jaroj, estis nepenseble traveturi milojn da kilometroj dum sekundoj. Korespondaĵoj ne atingis sian destinon en malpli ol unu tago. Por atingi la alian flankon de la mondo, estis necesaj longaj kaj multkostaj vojaĝoj, alireblaj al limigita rondo de la societanoj.

Post apero de interreto, distanco iĝis fakto nure fizika: per komputilo kun retkonekto, kio antaŭe estis ekstreme malproksima, tio iĝis apartigita nur per klako. Ekde tiam, per la daŭra teknika evoluo, aliro al la interreto ebligis ke, en kelkaj sekundoj, mesaĝoj, bildoj kaj sondosieroj ĉirkaŭiras la Planedon.

Akademiaj esploroj jam ne plu postulis horojn en biblioteko; novaĵoj fariĝis malnovaj post malmultaj horoj, eĉ tiuj rilatantaj al alilandaj okazintaĵoj; serĉado de labordungoj kaj servoj estis faciligita; entreprenoj eltrovis en



tiu nova ilo pli profitan manieron atingi la publikon kaj konsiderinde pligrandigi la vendojn, inter tiom da aliaj bonaĵoj.

Ia revolucio tamen montriĝis pli efika. Facileco de reta komunikado estigis novan manieron de interhoma rilato: sociaj retejoj. La tuja kontakto kun personoj de aliaj lokoj (eĉ se tio signifas la apudan apartamenton) ebligis ke la kundivido de ideoj kaj interŝanĝo de opinioj estas pli rapida.

Retejoj kiaj Twitter kaj Facebook konkeris milionojn da uzantoj en la tuta mondo kaj daŭre montras rapidan kreskon inter la novaj generacioj, kiuj jam naskiĝas konektitaj al la reto.

## Lingva interŝanĝo

Post venko de la defio pri distanco, kio ebligis proksimigon de kontakto, eĉ se apartigita per mejloj kaj mejloj, unu malhelpo persistis: la lingvo, eĉ se la angla




lingvo disvastiĝis kiel oficiala en la internaciaj kontaktoj.

Unu jarcenton antaŭ la apero de interreto, estiĝis lingvo duoble integriga: kun la celo plivastigi Pacon kaj mondan kunfratiĝon — kiu multe identiĝas kun la laboro de Legio de Bona Volo (LBV) —, Esperanto, la planlingvo plej parolata en la mondo, kreita de la kuracisto **Lazaro Ludoviko Zamenhof** (1859-1917), por samkiale alpreni lingvajn proprecojn similajn al tiuj de naciaj lingvoj.



José Antonio Vergara

Laŭ Universala Esperanto-Asocio (UEA), la vortstoko de tiu lingvo devenas ĉefe de okcidenteŭropaj lingvoj, dum ĝia vort- kaj fraz-farado rivelas fortajn slavajn influojn. La diversorigina deveno de Esperanto pruve faciligas la lernadon de aliaj lingvoj, kio altiras eĉ pli la atenton de gejunuloj ŝatantaj plurlingvecon.

La diverscela uzado de Esperanto ankaŭ garantias daŭran evoluon, kio igas ĝin lingvo viva kaj senĉese aktiva. Dum vojaĝoj, kulturaj interŝanĝoj, eventoj, en literaturo, lernado de lingvoj, televido kaj radioelsendoj, la lingvo estas vaste uzata.



Aniruddha Banhatti

Ekde la idealo-diskonigo de la lingvo per interreto, la esperantistoj konstatas en tiu komunikilo la okazon atingi pli kaj pli da homoj. *"La plej granda avantaĝo estas tio ke, per interreto, la personoj povas, pli facile, rapide kaj efike, renkontiĝi pere (kaj kunlabori por) Esperanto, pli ol antaŭe"*, klarigas al BONA VOLO s-ro **José Antonio Vergara**, ĉilia kuracisto kaj ano de la estraro de UEA pri faka kaj scienca agado.

Pli vasta diskonigo de la lingvo ebligis al pliaj homoj proksimiĝi al la esperantistaj idealoj. *"La nombro da vizitoj en mia grupo [asocio] kreskis post la apero de interreto"*, taksas s-ro **Aniruddha Banhatti**, barata verkisto kaj tradukisto.

Tiom estas la temoj internacie diskutataj pere de la lingvo, ke la retejo Vikipedio jam superas pli ol 140.000 artikolojn, enviciĝante kiel unu el la 30 lingvoj kun pli da legomaterialo disponebla en la paĝaro.

*"Esperanto kaj interreto havas multon komunan: la unua venis por demokratiigi la internacian komunikadon kaj la dua la amaskomunikajn rimedojn"*, diras **José Roberto Tenório da Silva**, tradukisto, eldonisto kaj prezidanto de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP). *"Tiel, la internacia lingvo ekĝuas prestiĝon en interreto, laŭmezure kiel tiu pova komunikilo pli kaj pli fariĝas alirebla al la popoloj."*




José R. Tenório da Silva

S-ro **Wiliam R. Harmon**, ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio por Usono, kredas ke, pere de interreto, estas pli facile atingi la novan generacion de retuzantoj. *"Mi observas kreskon en la nombro de gejunuloj interesataj, kaj tio estas tre aŭgura por la estonteco de Esperanto",* li klarigis.

Esti konektita al la tutmonda komputila reto signifas havi aliron al miloj da informoj sen

neceso eliri el la hejmo, kio ebligis al Esperanto disvastiĝi tra la mondo per blogoj, retkursoj, retejoj de esperantaj kluboj kaj asocioj. Laŭ d-ro **Ŝandor Monostori**, hungara kuracisto, loĝanta en Aŭstralio, kunredaktoro de la revuo *Esperanto sub la Suda Kruco*, eĉ tiuj personoj vivantaj en foraj lokoj *"povas lerni la lingvon sen instruisto. Mi konis junulojn en Kusko, Peruo, kiuj lernis Esperanton nur per interreto"*.


Persona arkivo
Ŝandor Monostori

## La Esperanto de la Religioj

La karmemora fondinto de LBV, Alziro Zarur (1914-1979), elstarigis la disvolvo-potencialon de la lingvo de Zamenhof, enkondukante ĝin en la agadon de la Institucio. Tial, ekde sia fondiĝo, LBV prestiĝigas Esperanton per ĉiaj disponeblaj rimedoj, plenume al unu el siaj celoj: *"Batali por la plej granda disvastigado de la internacia lingvo Esperanto, altvalora ilo por la interfratiĝo de la popoloj, laŭ la konsidero ke LBV estas la Esperanto de la religioj, samkiel Esperanto estas la LBV de la lingvoj"*.

Kreita en unuaj jaroj de LBV, la Departemento pri Esperanto celas diskonigi ties Senlime Ekumenan mesaĝon al la tuta mondo, uzante la internacian lingvon kiel povan instrumenton de unuigo. Tiun ampleksan komprenon pri Ekumenismo havas la ĉefgvidanto de LBV, José de Paiva Netto, kiu de jardekoj stimulas la diskonigadon de la internacia lingvo, pro kio li estis distingita, okaze de la inaŭguro de la Templo de Bona Volo (TBV), en oktobro 1989, per "Arĝenta Plato" aljuĝita de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Tiu elstara premio troviĝas en ekspono en la Memorigejo omaĝanta la ĉefgvidanton de LBV, unu el la ĉambroj de la Monumento.


Plenume al la celo diskonigi, per la internacia lingvo, la ekumenan kaj fratecan doktrinon, inspiritan de la ekzemploj de Jesuo, la unua libro publikigita de la Institucio aperis en 1988: *Meditadoj kaj Pensoj — Dialektiko de Bona Volo*, de aŭtoreco de la verksito Paiva Netto.


Persona arkivo
William R. Harmon

Zorgema stimuli la diskonigon de Esperanto ankaŭ per interreto, celante ĉefe la junularon, Legio de Bona Volo regule ĝisdatigas la informojn ĉe Facebook, Twitter kaj YouTube. Krome, pere de retmesaĝoj novaĵleteroj kaj fotoj, ĝi ankaŭ partoprenas en esperantaj aktivecoj tra la tuta mondo.

Alia iniciato de la ĉefgvidanto de LBV estis enretigi la Portalon Bona Volo <www.bonavolo.com>, kies enhavo ĉiam prezentas la esencon de Ekumena Spiritualeco, konsiderante la plej diversajn kulturojn kaj valorigante ties popolojn pere de la internacia lingvo. Sen vundi aŭ ignori tion kion ĉiu popolo jam travivis, Legio de Bona Volo per sia retportalo havas la zorgon aldoni al ĉiu aparte siajn spertojn kaj valorojn, havigante la Bonon al ĉiuj nacioj. Per tiu sama retadreso, la retuzantoj havas ankoraŭ la oportunon lerni la lingvon kreitan de Zamenhof kaj partopreni en tiu idealo de Frateco inter la popoloj.





Jéssica Botelho

Fabiano Henrique, radiisto.

# Pli ol mil aliĝintoj en internacia evento

Novaĵoj el la Malsupraj Landoj konfirmas ke 1306 personoj jam aliĝis al la ĉi-jara UK. La evento okazos en Kopenhago, Danio, inter la tagoj 23a kaj 30a de julio. Laŭ informoj rikoltitaj la 13an de junio, la nombro da reprezentantaj landoj estas 67. La plej multaj aliĝoj venas el Francio, entute 165 kongresanoj. Sekve aperas Germanio kun 131.

# Bulgara Esperanto-Asocio starigas Internacian Literaturan Konkurson

Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson "Hristo Gorov — Hrima", kiu okazos en ĉiu tria jaro. En la konkurso povos partopreni verkistoj, poetoj, ĵurnalistoj el ĉiuj landoj. La konkurso havos la jenajn branĉojn: poezio, prozo kaj artikolo. Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per du poemoj, originale verkita en Esperanto. La noveloj devas esti ĝis 4-paĝaj, ankaŭ originale verkita en Esperanto. Kvankam la konkurso ne havas apartan temon, la artikoloj estu dediĉataj al signifa Esperanto-aranĝo. La gajnintoj ricevos signifajn premiojn. La rezultoj estos anoncitaj en monato oktobro 2012. Por partopreni sendu viajn kontribuojn ĝis la 1-a de septembro 2012 al retpoŝta adreso: <modest@abv.bg>.

# Hungaroj aperigas kalendaron pri esperantaj eventoj en interreto

La novaĵretejo *Eventoj* flegas en interreto internacian kalendaron pri esperantaj aktivadoj. La retpaĝo funkcias ekde 1995 kaj prezentas informojn pri ĉiuj landoj kie okazas publikaj iniciatoj favorantaj la neŭtralan internacian lingvon. La retuzantoj povas sendi sciigojn por pliriĉigi la agendon. La kalendaro viziteblas per la adreso www.eventoj.hu.

# Japanio prepariĝas por akcepti esperantistan junularan kongreson

La ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso okazos en Japanio. La eventon gastigos Naha, ĉefurbo de la insularo Okinava. Je la dua fojo tia evento okazos en tiu lando. Unuafoje ĝi okazis en 1965. Laŭ la direktorino de TEJO, Sasha Kovjazina, la aktivadoj disvolviĝos en junula centro, en la sama loko de la komuna loĝejo. Pri la organizado respondecas la Japana Esperanto-Junularo.

# Eŭropanoj invitas al somera lernado de Esperanto

Inter la tagoj 30a de julio kaj 7a de aŭgusto, okazos la Somera Kursaro de Esperanto. La aktivecoj disvolviĝos en la urbo Nitra, okcidente de Slovakio. Oni ofertos kursojn, laŭ diversaj niveloj, gvidatajn de kvin instrugrupoj. Krom lecionoj, la programo inkluzivas artajn prezentojn, sporto-praktikojn, promenojn kaj esperantan dancarangôn. Pri la pedagogia kunordigado zorgos la teamo de la retejo Lernu.net.

# Plej granda retvortaro

Ĉio glate iras rilate la enretigon de la plej fama esperanta vortaro. Post kelkaj monatoj, *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) estos konsultebla de retuzantoj en la tuta mondo. La novaĵon diskonigis la novaĵretejo *Libera Folio.* La laboroj jam komenciĝis. Laŭ la artikolisto Jevgenij Gaus, la unuaj rezultoj estos prezentataj okaze de la sekva UK, en Kopenhago, fine de julio.

## Retuzantoj pridiskutas la tagon de esperanto ĉe Twitter

La ago estis difinita por la 26a de julio, lanĉo-dato de la unua lernolibro de la internacia lingvo. Per tiu iniciato oni celas diskonigi la lingvon, strebante ripeti la sukceson de la sama kampanjo ĉe Google, en la pasinta jaro.

# UN malfermas la pordojn al Esperanto

La Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) havigis al la Universala Esperanto-Asocio la rajton indiki reprezentantojn por agado en ĝiaj oficejoj. La decido estis publikigita de la ĝenerala organo de UN. Ĉi-jare la plej grava asocio de la esperantista movado havos 11 nomumitojn. Prof-ro Humphrey Tonkin agados ĉe la sidejo de UN en Nov-Jorko. En Vieno, ĉefurbo de Aŭstrio, agados Hans Michael Maitzen. Stefano Keller laboros en Ĝenevo, Svisio. La ceteraj esperantistoj elektitaj estos asistantoj kaj kunlaborantoj en la tri sidejoj de UN.

# Pli ol 140 mil artikoloj reliefigas Esperanton en Vikipedio

Dek jarojn post apero de la reta enciklopedio Vikipedio, Esperanto pli kaj pli reliefiĝas en tiu retejo. Laŭ freŝdataj datumoj, jam estis skribitaj pli ol 140 mil artikoloj en la neŭtrala lingvo. Por tio estis uzataj pli ol 30 milionoj da vortoj, kio kompareblas al tradicie presita enciklopedio. Fontoj ligitaj al la portalo certigas, ke ĉiu-hore registriĝas ĉirkaŭ 15 mil vizitoj en la tuta mondo.

# Meksikanoj starigas esperantan fondaĵon

Laŭ novaĵoj el Meksiko, kreiĝis Fondaĵo Esperanto Internacia. La organizaĵo havas sidejon en la urbo Querétaro, en la centro de la lando. La ĉefaj celoj de la direktoraro estas instruado kaj diskonigado de Esperanto. Alia celo alstrebota estas enkonduko de Esperanto kiel opcia lernobjekto en la meksikajn lernejojn.

# Allogaĵo de la Plena Civitaneco kaj de Ekumena Edukado

Rilatoj laŭ la vidpunkto de kelkaj protagonistoj de la historio de lernejo de LBV.

**Leila Marco**

Rio-de-Ĵanejro estas unu el la urboj plej memorigataj verse kaj kanzone en la tuta mondo. Ĝi estas ofta inspiro por poetoj, verkistoj kaj komponistoj, pro la naturaj belaĵoj, kuniĝo inter maro kaj montaro, kaj pro la tipa gajeco de la loĝantoj. De 15 jaroj la samnoma ŝtata ĉefurbo ekhavis plian motivon fieri: la Eduka, Klereca kaj Komunuma Centro José de Paiva Netto. Nun, en 2011, la laboro de LBV plivastiĝas je du frontoj: tiu de la Eduka Centro kaj tiu de la Komunuma Centro de Sociala Asistado.

De kelkaj jaroj, la konstruo de la ensemblo inkluziviĝis en la planoj de la direktoro-prezidanto de LBV, José de Paiva Netto, malgraŭ tio ke la Institucio jam disvolvis en tiu ŝtato dekojn da sociedukaj aktivecoj. Ekde la 1980-aj jaroj, li komencis dediĉi sin al fondo de plej bonaj edukejoj tra la lando — ĉefa engaĝiĝo de Legio de Bona Volo rilate al bonkvalita Edukado. Per bonega teknika ilaro kaj instru-sistemo interplektita kun ekumenaj, etikaj kaj spiritaj valoroj, formiĝas la bazo de la Pedagogio de Amo, direktata al infanoj ĝis 10-jaraj, kaj de la Pedagogio de Ekumena Civitano, por individuoj ekde 11-jaraj. Ĝuste pro tiu noviga pedagogia propono, kreita de la edukanto Paiva Netto, la aktivecoj en la lernejoj, hejmoj kaj komunumaj centroj de la Organizaĵo sukcesas la plej bonajn rezultojn.

## Raportoj kiuj kuraĝigas kaj kortuŝas

La eduka ensemblo de Legio de Bona Volo en Rio-de-Ĵanejro, kompletigas 15 jarojn kun belaj rakontoj por diskonigi. En tiu grava spaco por kleriĝado kaj civitaneco, miloj da infanoj, junuloj kaj maljunuloj, resume, tutaj familioj, ricevis kaj plu ricevas apogon, studon, respekton kaj Amon.

En ĉi tiu eldono de BONA VOLO, la leganto akompanas du rilatojn, la vivon laŭ la vidpunkto de ĉiu protagonisto. Ĉiu sperto ĉi tie kundividita spegulas la sukceson de la laboro de LBV kaj sekve la plezurigan konstaton pri la kapablo de la brazila popolo venki defiojn.




Fotos: shutterstock.com

Vivian Ribeiro Ferreira


# Formado de honestaj homoj

Por la dommastrino **Eliana Lannes de Oliveira**, paroli pri Legio de Bona Volo ĉiam venigas rememorojn, vekas dankemon kaj kortuŝas. Ĝuste en tia etoso de Frateco ŝi kaj la gefiloj **Áliton Lannes de Oliveira**, **Aguilar Alves Celestino Jr.**, **Igor Lannes Gregório** kaj **Beatriz Lannes Santos**, akceptis la skipon de BONA VOLO en la loĝejo de Aguilar, en la kvartalo Inhaúma, nordaregione de Rio-de-Ĵanejro. Komence de la renkonto, la dommastrino nepre insistis montri fotojn pri la *"lerneja tempo de la knaboj"*, ĉefe tiujn pri iliaj diplomricevo ĉe LBV.

La du pli aĝaj filoj, la 21-jaraj ĝemeloj, Áliton kaj Aguilar, konservas dankemajn rememorojn pri tiu epoko dum kiu ili partoprenis en diversaj aktivecoj realigataj en la Eduka Centro José de Paiva Netto, inkluzive de la Ekumena Infana Koruso de Bona Volo. Kiel lernantoj de la unua klaso, kiuj kompletigis la komencajn ciklojn de la fundamenta instruiteco en tiu lernejo, la du fratoj havis la okazon regali per muzika prezento la ĉefgvidanton de la Institucio, okaze de lia vizito al la loko. *"Ni kantis la muzikon* Amikoj por ĉiam *por la Frato Paiva, en iu tago kiun mi neniam forgesos. Li emociiĝis pro la Koruso, kaj ankaŭ ni. Estis tre kontentige, ĉar la Frato Paiva vidis ke ni estas bone zorgataj kaj feliĉaj tie. Unu el liaj zorgoj, okaze de tiaj vizitoj, estis scii kiel ĉiu lernanto estas prizorgata"*, memoras Aguilar.

La tenereco de la direktoro-prezidanto de LBV markis tiujn knabajn korojn kaj konserviĝas en la agrablaj rememoroj de formitaj homoj. *"Li estas nia dua patro, ĉiam zorgema pri nia estonteco, pri tio ĉu ni ricevas preparon por esti bonaj homoj kaj havi bonegan edukadon"*, diris Áliton, kiu nuntempe laboras pri estrado de personaro en banka entrepreno de Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. Siavice, la frato Aguilar soldatiĝas en la aerarmeo.

El la sennombraj piedpilkaj partioj, ludataj en la plursportejo de la eduka konstruaĵo, kaj el la agrabla tempo de lernado restis tiu certeco por la ĝemeloj: la elstara edukado. *"La lernejo*



Fotoj: Persona arkivo



Aguilar (maldekstre) kaj Áliton (meze kun la brazila flago)

Fotoj: Lucian Fagundes



Aguilar, nuntempe, kiel soldato en la aerarmeo.



*de LBV instruis nin havi bonan prudenton en la vivo, respekti la instruistojn, la kunlernejanojn, pri la graveco de unuiĝo kaj danki al Dio pro ĉio. Ni havis instruistojn bone kvalifikitaj, kiuj edukis nin serioze (...). La lecionoj de kanto estis unu el la aferoj pli plezurigaj el tiu periodo"*, rememoras Aguilar. Por la junulo, la instruo ofertita de LBV faris la tutan diferencon: *"Tie ni ĉiam havis iun al kiu peti helpon. Unu el la unuaj aferoj, kiun mi lernis estis preĝi antaŭ la komenco de la leciono kaj en la horo de la manĝoj. Mi lernis ke ni neniam estas solaj, eĉ en tiuj momentoj plej komplikaj; en tiuj horoj estas iu tie Supre je kiu ni povas fidi kaj kiu helpas nin"*.

Malgraŭ la ĉiutagaj farendaĵoj, Aguilar ne malproksimiĝis de la Institucio; ĉiam kiam li povas, li faras viziton al LBV cele ĝui pluan fojon la etoson de la edukejo. *"Kiam mi vidas la personojn, rigardas fotojn sur la tabulo, tio ja estas tre agrabla! Mi partoprenis multajn aferojn, lernis gravajn valorojn por la tuta vivo. Estas ĉiam ĝuinde reveni kaj vidi la personojn, kiuj konis min kiel infanon. Legio de Bona Volo havas tre belan historion, kiu neniam povas finiĝi; ne pro mi, sed pro tiom da aliaj infanoj, kiuj studos tie, danke al la Frato Paiva kaj al la karmemora Frato Alziro Zarur"*, li diras emocie.

S-ino Eliana enskribigis la ĝemelojn en la lernejo de LBV tuj post ĝia inaŭguro, en 1996. Laŭ ŝi, multaj estis la petoj por iu loko, pro la infrastrukturo, organizado kaj oportuneco por ke la gepatroj lasu la gefilojn dum la tuta lerneja periodo. *"Mi estas tre feliĉa partopreni en tiu 15 jaroj da historio de la Eduka Centro. Kiam mi ricevis la sciigon ke la sociala asistantino de LBV telefonis por informi ke iliaj aliĝoj estas konfirmitaj, mi restis tre surprizita kaj kontenta"*.

Dankema, tiu patrino emociiĝas parolante pri la malfacilaj momentoj kaj pri kiel la familio sukcesis superi ilin, danke al la helpo de la Organizaĵo. *"Mi multe bezonis la lernejon, ĉar tiutempe mia patrino malsaniĝis kaj mi devis zorgi pri ŝi. Dum iom da tempo mi restis sen laboro, malfacila situacio, sed ĉar ili restis tie la tutan tagon, ili revenis hejmen puraj kaj nutritaj... Mi ne maltrankviliĝis pri dentisto, ĉar tie estis en la lernejo; okaze de iu ventrodoloro aŭ iu alia afero, ili povus viziti la kuraciston de la lernejo, kaj la instruistinoj informis min pri tio kio estis farita. Ĉio tio por mi estis malpeziĝo"*.

**"Legio de Bona Volo havas tre belan historion, kiu neniam povas finiĝi; ne pro mi, sed pro tiom da aliaj infanoj, kiuj studos tie."**

**Aguilar Celestino**
Ekslernanto de la Eduka Centro José de Paiva Netto, en Rio-de-Ĵanejro.

Poste, ankaŭ Igor kaj Beatriz



**FAMILIA PORTRETO** — De maldekstre: Igor, Aguilar, Áliton, la patrino Eliana kaj Beatriz. Ĉiuj trovis en LBV la necesan subtenon por la plena civitaneco.

Fotoj: Lucian Fagundes



Aguilar kun sia edzino **Fabíola** kaj la filo **Caio**.

> "LBV malfermis la pordojn al mi, kiam mi plej bezonis (...), LBV ĉiam ĉeestis."
> **Elaine Lannes de Oliveira**
> Patrino de kvar eksgelernantoj de lernejo de LBV

enskribiĝis en la edukejo de LBV. Tiam, s-ino Eliana jam sciis kion signifas tiu spaco por ŝia familio: *"Estas vero, tie estas la dua hejmo de niaj gefiloj. Ĉiuj funkciuloj havas estimon al la infanoj, tio estas sekureco por ni. LBV malfermis la pordojn al mi, kiam mi plej bezonis, kiam mia patrino suferis infarkton kaj fariĝis malfacile zorgi pri miaj etaj gefiloj; LBV ĉiam ĉeestis".*

Kun larĝa rideto, la patrino rememoras, ke ŝi preterlasis nenian eventon en la lernejo. *"Mi ĉeestis ĉiujn, fotis, amegis tiajn festojn. Venis tempo kiam mi komencis labori de dimanĉo ĝis dimanĉo kaj eĉ tiel mi eltrovis manieron aperi por akompani miajn gefilojn. (...) Mi ĉion dankas al la Frato Paiva kaj al ĉiuj instruistoj".*

Pro ĉio tio, s-ino Eliana rekomendas: *"Plu helpu al LBV, vizitu la lernejon de la Institucio, konatiĝu kun ĝi, ĉar valoras la penon. Miaj gefiloj nun estas tie, ili estas bonaj geknaboj, danke al Dio. Paiva Netto, dankon! Vi vere havas ian Legion de Bona Volo".*

# Investi en sporton

La kunlernejanoj de **Igor Gabriel Iglesias de Souza,** lernanto de la kvina lernojaro en la Eduka Centro José de Paiva Netto, rekonas en li la spiriton de vera sportisto. Helpata de LBV ekde sia unua vivjaro, nuntempe, naŭjara, li elstariĝas en la lernejo pro la bonaj notoj kaj pro la famo de atleto de la klaso. Li estas ludisto de basketbalo en la Klubo de Ŝipkonkurado Vasco da Gama kaj konkurse naĝas por la Futbala River-Klubo.

La historio de superado de la knabo Igor komenciĝas, kiam li ankoraŭ estis bebo. Antaŭ preskaŭ unu jardeko, la Institucio malfermis la pordojn por lia patrino, **Ana Paula Iglesias da Silva**, tiutempe maldungita kaj sub la respondeco zorgi pri la knabo kaj la pliaĝa fratino, **Bianca**. *"Tio estis malfacila periodo en nia vivo, li estis malgranda kaj mi serĉadis laboron. Mi vizitis la lernejon de LBV, enskribigis lin kaj restis preĝanta"*, rememoras la patrino.

Kiam ŝi ricevis la novaĵon, ke ŝi sukcesis lokon por la gefiloj, Ana Paula klarigas ke la kontenteco alvenis duoble: *"Tio estis grandega ĝojo, ĉar ĝi koincidis kun mia dungo-akcepto; (...) estis kontentige havi miajn gefilojn en la lernejo de LBV"*.

Por la familio, la oportuno esti akceptita en la eduka centro de LBV signifis la unua venko de tiu infanatleto. Kun la paso de la tempo, li ekkonkeris bonajn rezultojn en la lerneja kaj sporta vivoj. La lecionoj pri Korpekzerca Edukado ekde la komenco motivigis la knabon, rakontas la patrino. *"Li vidis la teamon ludi basketbalon kaj li volis fari la samon. Ĉar sporto estas tre stimulata ĉe LBV, lia ŝato ekkreskis kaj li engaĝiĝis pli kaj pli"*.

Baldaŭ aperis oportuno por ke Igor trejnu en Vasco. En tiu tempo, la patrino decidis ke la filo praktikos naĝarton, por ke li malstreĉiĝu en la paŭzoj inter la trejnoj kaj la lernejaj aktivecoj. Malkiel ŝi atendis, la knabo komencis sin dediĉi multe pli al la nova okupo. Laŭ Ana Paula, Igor jam elstariĝis kiel naĝanto.

La fiera patrino montris al la skipo de BONA VOLO la kolekton da medaloj jam konkeritan de la filo en konkursoj de la du kategorioj. Por la familio, gravas ke sporto enkondukiĝis en la vivo de Igor, sen ia ajn malhelpo al lia lernokapablo en la studoj: *"La instruistoj ĉiam laŭdis lian konduton, liajn notojn. La personoj komentas ke li tre maturas, malgraŭ la aĝo. Tio feliĉigas min, ĉar li ĉiam bone lernis pri la aferoj en LBV. (...) Mi estas nur dankema. Mi deziras ke venu multaj pliaj 15 jaroj al tiu lernejo, ĉar ĉi tie ĉio fariĝas kun multe da amo kaj estimo"*.

Fotoj: Lucian Fagundes



## Igor de Souza: bonaj rezultoj en la lernejo kaj en la sporto.





Igor kaj la patrino, Ana Paula. Por ŝi, la filo multe lernis en LBV kaj ŝia deziro estas *"ke venu multaj pliaj 15 jaroj al tiu lernejo, ĉar ĉi tie ĉio fariĝas kun multe da amo kaj estimo".*

En 2010, Igor gajnis studostipendion de la klubo Vasco da Gama, por viziti privatan lernejon de Rio-de-Ĵanejro. La knabo tamen petis ion al la patrino: ke ŝi ne akceptu la translokiĝon. La familio volonte aŭdis la klarigon de la malgranda atleto kiu, laŭ sia maniero sin esprimi, konfirmis la kvaliton kaj la distingon de Edukado kiu investas en la kompletan formadon de la individuo, edukante "Cerbon kaj Koron". *"Mi ŝatas studi en LBV, ĉar mi lernas havi estimon al la geinstruistoj, dediĉon al la studoj, respondecon. Mi volas danki al Paiva Netto pro ĉio kion nia lernejo havas."*

# Tutmonda Edukado

## Okaze da serio da oficiala vojaĝo, Sekciestro de Unuiĝintaj Nacioj partoprenas eventon de LBV en Suda Ameriko.

Nathália Valério



**El Radakcio**

La 28an de marto, la Sekciestro de NRO-j de la Departemento pri Sociaj kaj Ekonomiaj Aferoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN/Desa), d-ro **Andrei Abramov**, partoprenis en la 8a Intersektora Forumo Reto Solidara Socio — 5a Foiro pri Novigoj apoge al la Jara Registara Revizio de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok), evento realigata de Legio de Bona Volo en Rio-de-Ĵanejro.

Komence de la mateno, li vizitis lokon, kie LBV subtenas laboron en la Repacigita Komunumo Providência. Tie la Institucio agadas per la programo *Spaco por Kunvivado,* kiu kontribuas al disvolviĝo de malriĉaj personoj kaj familioj. Plia sukcesa iniciato estas la helpo, kiun LBV havigas al malriĉaj infanoj de la komunumo kaj kiuj ĉeestas la lecionojn pri karateo — realigataj de Paciganta Polico-Stacio (UPP) — kadre de la kampanjo *Sporto estas Vivo, ne perforto!*. Okaze de la vizito, la karateo-praktikantoj faris teknikajn prezentojn por la reprezentanto de UN.

La surloka agado de LBV estas rezulto de partnereco inter la Institucio, *Super Rádio Brasil* - 940 AM (elsendstacio de Komunikado de Bona Volo) kaj la registaro de Rio-de-Ĵanejro kiu, pere de la Subŝtata Sekretariejo pri Sporto kaj Distro, apogas

la laboron kadre de la projekto Rio 2016.

Dum la vizito, la prezidanto de la Superintendantejo pri Sportoj en la Subŝtato Rio-de-Ĵanejro (Suderj) reliefigis la gravecon de la vizito de UN-reprezentanto al la komunumo. *"Nuntempe, ne nur Suderj, ankaŭ la Sekretariejo pri Sporto kaj Distro, kaj ĉefe LBV, granda partnero kaj aliancano de ĉiuj tiaj iniciatoj, helpas al tio ke pli kaj pli la komunumo estu pli proksima por ke ni povu venigi tion al aliaj komunumoj. (...) Tial gravas ke ne nur la Registaro, sed la privata iniciato pensu kune cele havigi al tiuj infanoj la plejbonon. (...) Estas interese ke, kiam foje la Registaro ne povas ĉeesti en iu momento, LBV venas kaj vokas nin, kaj inverse. Ni do kunagu, ĉar tiel ni antaŭeniras en ĉiaj [fakoj]. Tio estas mirinda."*

La sukcesa partnereco inter LBV kaj aliaj organizaĵoj envolvitaj en la projektoj de la repacigita komunumo estis memorigata de la komandanto de UPP-Providência, kapitano **Clauco Schorcht**. *"Estas plezure pluan fojon kalkuli je tiu fruktodona partnereco de LBV. Kompletiĝos unu jaro kaj ni jam povas observi diversajn ŝanĝojn en la komunumo, ĉefe ĉe la pli juna publiko kaj ĉe tiuj infanoj partoprenantaj en la projektoj. Ni tre ŝatus danki pro tiu partnereco kun LBV! Tuj post mia alveno, LBV aperis kaj proponis tiun partnerecon kun ni en tiu aktivado pri karateo, per kio eblis montri al tiuj infanoj, ke ili povas havi plibonan mondon. Ili povis partopreni en konkursoj ekster la subŝtato: unu en San-Paŭlo kaj alia en Salvadoro; tiel ni povis montri ke, pere de sporto, ia reala ŝanĝo eblas."*

Post sia vizito, d-ro Andrei Abramov iris al la Eduka Centro José de Paiva Netto, en Del Castilho, en la norda parto de la urbo. La agendo inkluzivis viziton al la eduka konstruaĵaro de LBV kaj prelego pri la temo *Dua Celo de la Jarmilo: atingi universalan elementan edukadon*, okaze de la 8a Intersektora Forumo Reto Solidara Socio — 5a Foiro pri Novigoj.


Alexandre Herculano

Maldekstren: la geedza paro Lucimara Augusta kaj Paiva Netto, la UN-reprezentanto d-ro Andrei Abramov kaj Raquel Bertolin, de LBV.


Nathália Valério

Sur la foto, akompanas la vizitanton, d-ro Abramov, al Repacigita Komunumo Providência, Danilo Parmegiani (meze), de LBV, kaj komandanto de UPP-Providência, kapitano Glauco Schorcht.




Per mesaĝo sendita al LBV, s-ino Ursula Grattapaglia ĝoje esprimis dankemon skribante sur ĉiu foto kiun ŝi sendis: "bela donaco"; "vivu LBV!"; "tre dankon!".

# Direktorino de la Bieno-Lernejo
# Bona Espero dankas al LBV

**Jéssica Botelho** kaj **Paulo César Pereira**

Situanta en la urbo Alto Paraíso de Goiás, ĉirkaŭ 250 km for de Braziljo, la Bieno-Lernejo Bona Espero asistas infanojn kaj adoleskantojn en situacio de socia risko, sub la gvido de la esperantista paro **Ursula** kaj **Giuseppe Grattapaglia**. Krom la devigaj lernobjektoj, la lernejo ofertas lecionon de Esperanto kaj akceptas vizitantojn el la tuta mondo.

Kadre de sia tradicia kampanjo *Infano Noto 10 — Sen Edukado ne estas Estonteco!*,





Persona arkivo



Arkivo BV

La gesinjoroj Grattapaglia en la Templo de Bona Volo, unu el la Sep Mirindaĵoj de la brazila ĉefurbo.

Legio de Bona Volo, zorgema pri la valorigo de infano, subtenas ne nur siajn Edukajn Centrojn, sed ankaŭ lernejojn partnerajn de la Institucio, kiel Bieno-Lernejo Bona Espero, kiu ricevis de LBV, komence de ĉi tiu jaro, donacon de garnituroj de lerniloj por siaj lernantoj.

Per mesaĝo sendita al Legio de Bona Volo, la direktorino Ursula skribis: *"Nome de la infanoj kaj edukantoj, mi transdonas nian plej sinceran dankon al LBV kaj al d-ro Paiva Netto pro la malavara donaco de lerneja materialo por la infanoj protektataj de nia institucio".*

S-ino Ursula ankoraŭ substrekis la kontentecon de la infanoj ĉe ricevo de la materialo: *"Tiel valora donaco por la kuranta lernojaro havas grandan signifon por ni ĉiuj, konsidere al la socia situacio pli kaj pli malfacila; kaj la ĝojo de la infanoj transiras la imagemon".*

Tiu aserto estas ilustrita en la fotoj, kiuj registras la ĝojan momenton de la infanoj ricevantaj la garniturojn de lerniloj kaj kriantaj *"Vivu LBV!".*

Fine de la mesaĝo, s-ino Ursula reliefigas la Templon de Bona Volo, monumenton, kiun ŝi ĉiam vizitas kun sia edzo kaj alilandaj amikoj, kiuj vizitas la landon: *"Ni plu venigas esperantistajn volontulojn por admiri vian Templon, unikan pro ĝia beleco kaj harmonio".*




# Duona jarcento da agado en la Bono

**Generacioj unuigitaj per Bona Volo memorfestas 50-jariĝon da infanjunula protagonismo**

Danielle Tonin

Gejunuloj alfrontas grandajn defiojn kaj zorgas pri multaj aferoj: sekvi rapidiĝantan mondon bazitan sur teknologia disvolvo; sociaj malegalecoj kaj maljustecoj; malfacilaĵoj aliri la labormerkaton; daŭripoveco de la vivo en la planedo; problemoj rilatiĝi kun la familio... finfine, tiu konstato ke "Mankas humaneco ĉe la Homaro", kiel avertas la direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo, José de Paiva Netto.

Ĉiam atenta al la socia scenejo en kiu la junulo estas enmetita, de pli ol 60 jaroj LBV proponas spacojn por junulara partopreno en la socio, cele disvolvi la potencialon de ĉiu junulo, plifirmigante kaj plivastigante iliajn talentojn pere de agadoj por konstruo de plibona realaĵo.

Kredante, ke la gejunuloj kapablas mem rompi tiun kulturon de premiteco kaj indiferenteco, la Ekumena, Agema Junularo de la Bona Volo de Dio memorigas pri sia 50-jara historio da junula protagonismo cele pensigi la socion pri la eterna *juneco* estigita per la praktiko de la Dia, Solidara Amo instruata de Jesuo, en Ties Nova Ordono, kaj proklamita de la Religio de Dio, la ekumena religio de Brazilo kaj de la mondo, en 1973 kiel tiu *Filozofia Ŝtono*, kiun la alkemiistoj serĉis dum jarcentoj, ŝlosilo por la eterna juneco, fonto de ĉiaj riĉaĵoj.







**Reliefe la juna Paiva Netto partoprenas la unuan Rondiradon de Karitato, la 1-an de septembro 1962, en Rio-Ĵanejro/RJ. Sur la foto, la promesanta ĵurnalisto plene raportis pri la asistado fare de Legio de Bona Volo. Dum la mondo rememoris pri la terura Dua Mondmilito, Zarur, en la aŭditorio de la Radistacio Bona Volo, proklamis "mondmiliton kontraŭ malsato". Tiam, naskiĝis la Rondirado de Karitato, unu el la plej antikva, socia programoj de LBV.**

Ĉi-jare, la 15an de oktobro, la Ekumena Junularo de LBV kompletigas 50 jarojn da Agado por la Bono. Tiu movado, proponita de Paiva Netto en 1961 al Alziro Zarur, karmemora fondinto de LBV, konsistas el ĉiuaĝaj gejunuloj*. Ili ĉiujn kunigas la sindevontigo plivastigi la Idealon de Bona Volo, kaj por tio ili kalkulas je spacoj por dialogo, socia interveno, komunikado, arto kaj kulturo, strebe al spirita reedukado de ĉiuj personoj favore al la Homaro. Ekde tiam, Paiva Netto estras tiun agadon en la Bono.

Omaĝe al tiu signifa dato, la 36a Internacia Forumo de la Juna Aganto de la Bona Volo de Dio havis kiel defion disvolvi la temon "Junularo: Havi Bonan Volon por plibona mondo!". Sub tiu aspekto, oni debatis pri la vera signifo esti juna kaj ĝui tiun junecon ĉiutage, en ĉiaj aĝoj.

Ĉiam baziĝanta sur iu ĉeftemo, tiu Forumo okazas ĉiujare, komence de julio ĝis la fino de junio de la sekva jaro, ĉe celebrado de la senhalta laboro kaj agado de Paiva Netto ĉe LBV (la 29an de junio). Ĉi-jare, la 2an de julio, la konkludo okazis en la tuta Brazilo kaj alilande (Argentino, Bolivio, Paragvajo, Urugvajo, Portugalio kaj Usono). ●

*Ĉi tiu citaĵo aludas al la maksimo "Junulo estas tiu kiu ne perdis la idealon", de aŭtoreco de Paiva Netto.

# BONA VOLO POR ŜANĜI KUTIMOJN



Reprodukto BVTV






## Infana ĉefrolo por tergloba ŝanĝo

Reliefigante la temon "Bona Volo por ŝanĝi kutimojn", Legio de Bona Volo okazigis, la 26an de marto, la 8an Internacian Forumon de la Soldatetoj de Dio, de LBV, en lernejoj kaj komunumaj centroj de la Institucio situantaj en Brazilo kaj alilande.

Preparita ĉefe por infanoj — la Soldatetoj de Dio, kiel karese estas nomataj la geknaboj en la Institucioj de Bona Volo — tiu forumo okazas ekde 2003, kiam ĝi estis elpensita de la ĉefgvidanto de LBV, la ĵurnalisto kaj edukanto José de Paiva Netto, kun la celo impulsi la infanan protagonismon kaj kuraĝigi ilin al travivado de valoroj etikaj, ekumenaj kaj spiritaj. "Ni bezonas montri, ke infana konsidero estas konsidero kiu havigas al ni antaŭvidon pri plibona mondo (...). La infanoj havos okazon sin manifesti (...) ĉar infanoj bezonas lerni sin defendi (kun Amo kaj inteligenteco)", tiam diris la ĉefgvidanto.



Temas pri evento malfermita al la ĝenerala publiko kaj celanta ĉefe familiojn. Ĝi estas farita de kaj por la infanoj. Pri la temo de la evento, la edukanto Paiva Netto skribas:

### "Manĝilaro kaj Spirito

"Mi ripetos al vi pecojn de mia improviza parolado al ili, ĉe la fermo de la Forumo: Kia plezuro ĉeesti hodiaŭ kun vi. Mi emas elstarigi fakton, kiun la plej multaj inter vi jam konas: infanoj mem estras ĉi tiun eventon. Kompreneble, kun apogo kaj sperto de pli maljunaj homoj, sed ili mem elektas temojn kaj tiom da aktivecoj sendube firmigas la riĉecon de forumo naskita kaj elvolvita de ili mem.

### "Ĉielaj Civitanoj

"Ŝanĝi kutimojn. Sed kiel? Kio estas nepre necesa? Multaj homoj ne plu manĝas per la manoj kaj ekuzas manĝilojn. Ŝanĝiĝis la kutimoj de tiuj homoj. Sed ĉu tio estis sufiĉa ŝanĝo? Kio ni estas? Super ĉio, ni estas Spiritoj, kiuj pormomente okupas korpon! Do, sekve de tio ni devas rezoni. Pro tio mi tiel ofte insistas paroli al vi pri civitaneco de la Spirito. Per mia verko *Urĝas reeduki!* mi traktas tiun temon. Ĉar se ni ne scias pri nia deveno, ĉiuj niaj agoj eble fariĝas misaj. Kaj okazos frakaso pro eraro post eraroj.

"Kion vi pensas pri la propono reanalizi la situaciojn por komenci novajn, ĝustajn paŝojn? Per tia kono ni povas okazigi ŝanĝojn, kiel neniam antaŭe. Se ni estas unue Spiritoj, sekve ni submetiĝas al leĝoj, kiuj staras super plej gravaj juraj instancoj sur la Terglobo. Kial?! Kodo Hamurabi, Romia Juro, reformo de Civila Juro farita de Napoleono Bonaparto (1769-1821) estas ĉiuj altvaloraj. Sed ili limiĝas al surtera scio. Kaj ni, pli ol landcivitanoj, estas Ĉielaj Civitanoj. Ni devas deiri de Spirito, kiu estas eterna. Sekve, ni esploru, kiel ĝi funkcias."





Roseli Garcia

La-Pazo/Bolivio



Felipe Tonin

San-Paŭlo/Brazilo


Allison Bello

Asunciono/Paragvajo


Aline Portel

Bonaero/Argentino


Bettina Lopez

Montevideo/Urugvajo



Priscilla Antunes

Rio-de-Ĵanejro/Brazilo



Maria Albuquerque

Novjorko/Usono


Arkivo BV

Porto/Portugalio

# Presu kaj amuziĝu

## Trovu la detalon similan al tiu de la bildo en distingo




## Kunligu la numerojn



## Trovu la ĝustan ombron




## Ĉu ni helpu la bovineton trovi sian patrinon?



## Respondoj

Trovu la detalon similan al tiu de la bildo en distingo
Respondo: 3.
Trovu la ĝustan ombron
Respondo: 1.
Ĉu ni helpu la bovineton trovi sian patrinon?






Plenumu vian parton!

## Sciu kie troviĝas LBV-on

**CENTRA SIDEJO**: Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • www.bonavolo.com • **ARGENTINO**: Calle José Mármol 964 • Boedo • Buenos Aires • CPA C1236ABL • Tel.: (+5411) 4925-5000 • www.lbv.org.ar • **BOLIVIO**: Calle Asunta Bozo Bistrot 520 • Zona Alto Obrajes (sector A) • La Paz • Casilla de Correo 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759 • www.lbv.org.bo • **USONO**: 36 W 44th Street Mezzanine (inter la 5a kaj 6a avenuoj) • Manhattan • Nova York • 10036 • Tel.: (+1646) 398-7128 • www.legionofgoodwill.org • **PARAGVAJO**: Calle Curupayty, 1452 • Barrio Villa Cerro Corá • Ciudad de Lambaré • Tel.: (+59521) 921-100/3 • www.lbv.org.py • **PORTUGALIO**: Comandante Rodolfo de Araújo, 104 • Bonfim • Porto • CP 4000-414 • Tel.: (+35122) 208-6494 • www.lbv.pt • **URUGVAJO**: Av. Agraciada 2328 • Aguada • Montevideo • CP 11800 • Tel.: (+5982) 924-2790 • www.lbv.org.uy

PACO SUR LA TERO AL LA HOMOJ DE BONA VOLO
LBV

LBV

**Helpu! www.legionofgoodwill.org**

Banko Santander: Bankokodo: 0239 • Kontnumero: 13002754-6

Banko HSBC: Bankokodo: 0343 • Kontnumero: 63275-24


VOCÊ QUER OS CARROS
MAIS PREMIADOS DO BRASIL?
VOCÊ QUER UM
Honda!
MELHOR COMPRA QUATRO RODAS 2010 UTILITÁRIO ESPORTIVOS LEVES
PESQUISA Os eleitOs QUATRO RODAS 2010 MINIVANS
PESQUISA Os eleitOs QUATRO RODAS 2010 GRANDE VENCEDOR
PESQUISA Os eleitOs QUATRO RODAS 2010 SEDÃS MÉDIOS
MELHOR COMPRA QUATRO RODAS 2010 CARROS DE 50 000 A 60 000 REAIS
ExpressService
O Pós-venda Honda foi eleito pela 6ª vez consecutiva o melhor do Brasil. Pode confiar!
PESQUISA Os eleitOs QUATRO RODAS 2010 ASSISTÊNCIA TÉCNICA
Consórcio Nacional Honda prestações a partir de R$ 793,35*
Agende um test drive
TODOS OS MODELOS COM ATÉ 5 ANOS DE GARANTIA TOTAL!
HONDA
RIO TÓKIO - BOTAFOGO
Rua General Severiano, 201
21 2122-4999
www.riotokio.com.br
RIO TÓKIO - RECREIO
Avenida das Américas, 14.001
21 2323-9000
www.riotokio.com.br
NARITA - BARRA
Avenida das Américas, 2001
21 3987-8888
www.hondanarita.com.br
A garantia estendida de 5 anos é opcional e possui um custo adicional de R$ 1.850,00. *O valor de R$ 793,35 refere-se a 75% da carta de crédito para aquisição do New Fit LX 1.4 Flex 101cv, câmbio manual, ano 2011/2011, com valor de R$ 41.178,75. Reservamo-nos o direito de corrigir possíveis erros de digitação. Fotos meramente ilustrativas.
RESPEITE A SINALIZAÇÃO DE TRÂNSITO